


sub la suda kruco ★
junio 2016

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 24 [2] numero 123 junio 2016

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero


15-a de aŭgusto 2015

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonajo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2015 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: Tristan McLeay vizitas la sanktejon ĉe Borobudur dum la trlanda kongreso en Indonezio



4. Kaptu la ŝancon



6. Amu vian proksimulon kiom vin mem!



9. Kia diferenco inter filozofio kaj religio?



13. Larĝdentaj ratoj invadas
Kennedy Vojon



14. Fotoj el la trilanda kongreso (dankon al
Kam Lee, Tristan McLeay & Peter Williamson)



22. Ri, li, ŝi / Pri la uzado de “ri”



23. Opinioj de
maljuna
spertulo




25. Ĉu renkonti la vjolon?



27.

Odoroj estas esprimeblaj per lingvo,
kondiĉe ke oni parolas taŭgan lingvon



28. La virino kaj la hundo



29.

Kion mi faris post la trilanda kongreso

junio, du mil dek ses

ESK vivas! Post mia averto en la pasinta numero pri manko de artikoloj, ni ricevis kontribuojn el kelkaj el niaj legantoj. Multan dankon! En ĉi tiu numero vi trovos tre interesajn kaj diversajn artikolojn el Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Bedaŭrinde, neniu sendis artikolon pri la kongreso en Indonezio. Tamen, ni havas multajn belajn fotojn.

Ĉu vi memoras la misteran foton kiu aperis en la pasinta numero de ESK? Vidu solvon pri tiu mistero en la antaŭlasta paĝo de ĉi tiu numero. Por ĉi tiu numero, jen alia mistera foto: kie estas la busto de Zamenhof (kun miaj belaj filinoj) en la ĉi tiea foto?

Do, tio sufiĉas por nun. Mi lasos spacon por niaj kontribuemaj legantoj!



Kaptu la ŝancon

SEAN HILTON KAJ LAUREN NOBLE (ADELAJDO)

Sean kaj Lauren el Adelajdo komencis lerni Esperanton antaŭ unu jaro. Dum decembro/januario ili jam bone uzis nian lingvon en Germanio kaj Nederlando.

Dum decembro kaj januaro ni vizitis Eŭropon. Ni vojaĝis tra Germanio kaj Nederlando per aŭto.

Estis nia unua renkontiĝo kun eksterlandaj esperantistoj. Kelkaj el ili eĉ ne parolis la anglan. Ĉar nia Esperanto-lingvokapablo estas ankoraŭ simpla, estis kelkfoje tre malfacile kompreni sed ni tre ĝuis la ŝancon uzi nian ŝatatan lingvon kun fremduloj.

Tamen, tio kio surprizis nin pli ol tio estis la fakto ke ni estis traktataj kiel familianoj kaj amikoj. Tute ne gravis al iu ajn ke ni ne povis paroli ESK | paĝo 4 | 123 | junio 2016

bonege. Ili salutis nin kaj donis al ni multajn mirigajn aferojn. Ekzemple, en Herzberg, Germanio, Petro kaj Sofia ŝoforis nin tra la urbo por montri al ni la esperantajn aferojn en 'la Esperanta Urbo' kaj rakontis al ni multajn historiajn aferojn pri la urbo kaj la lando. Ni vidis la buston de L. L. Zamenhof kiu salutas vizitantojn al la urbo, kaj vizitis la kastelon Herzberg, kie estas muzeo pri Herzberg, kaj diversaj "esperantaĵoj".

En Seiber, Germanio (proksime al Herzberg), ni restis en 'Hotelo Zum

Pass' kaj la hotelmastrino, Teresa, eĉ fermis la hotelon por akompani nin tra la montoj kaj al la kastelo! (Ankaŭ, la manĝoj en la hotelo estis tre bongustaj kaj faritaj kun amo, fakto kiun vi certe povas gustumi!) Teresa donas al ĉiuj homoj en la

hotelon la plej bonan servon kaj ni sentis nin familianoj.

Germanio certe estas bela kaj ni vidis multajn belajn vidindaĵojn. Kaptu la ŝancon renkonti esperantistojn kiam ajn vi povas.

Jen kelkaj fotoj pri nia vojaĝo.



Amu vian proksimulon kiom vin mem!

BOB FELBY (ADELAJDO)

Antaŭ, ni diru, 50 jaroj aŭ eĉ pli, laboris eksterlandano en Anglujo. Li sciis multon pri kokinoj kaj iliaj vivoj kaj tial li laboris en t.n. kokinejo kie oni produktis ovojn! Por produkti ovojn oni vere bezonas kokinojn, ĉu ne? Sed kompreneble tio dependas de la grandeco de la ovoj kiujn oni esperas vendi. Se kokinaj ovoj ne estas sufiĉe grandaj, oni tute ne havu kokinojn. En tiaj kazoj estas multe pli bone investi sian ne sufiĉan monon en strutoj!

Sed tiu juna kaj laborema eksterlandano loĝis tie en komforta dometo. En la teretaĝo estis kuirejo kaj manĝejo, du sidoĉambroj kaj necesejo, sed la necesejo situis iomete ekster la ĉefkonstruaĵo, sed tamen en la teretaĝo. En la supra etaĝo troviĝis du dormoĉambroj. Do, ne malbona loĝejo por juna eksterlandano kun eĉ tre belega edzino, kiu estis denaska anglino. Ili kune havis du etajn filojn. Krom tio la familio konsistis el neniuj hundo, sed du katoj. Unu testudkolora kaj alia nigra. Mi preskaŭ forgesis menci la plej gravan - kaj ravan - membron de la bona familio, etan blankan raton, kies nomo mi ne plu memoras.

Iun belan tagon, eble estis dimanĉo, ĉu vi volas ke tiu estu

dimanĉo? Do bone, iun dimanĉan matenon la ĉarma familio sidis en unu el la teretaĝaj sidoĉambroj de la dometo, t.n. mueleja dometo ĉar ĝi ja apartenis al la muelejo situanta tuj apud la dometo.

La du gepatroj sidis ĉe la tablo. Ili manĝis sian matenmanĝaĵon. Ĉe la tablo sidis ankaŭ la du filetoj, sed ili sidis sur specialaj seĝoj konstruitaj por infanoj ĉar la du filetoj ja estis ankoraŭ nur infanoj. Nun, pli ol kvindek jarojn poste, ili sidas, same kiel siaj gepatroj, sur ordinariaj seĝoj ĉe la tablo kaj manĝas sian matenmanĝaĵon.

La du katoj, unu nigra kaj alia testudkolora, sidis manĝante sian matenmanĝaĵon sur la planko. Ilia manĝado estis multe pli rapida ol tiu de la gepatroj, sed eble ĉar la gepatroj manĝis multe pli da matenmanĝaĵo ol la katoj. Do, baldaŭ la katoj estis finintaj sian matenmanĝadon kaj iris kuŝi kaj dormi, ĉar post sia manĝado ili ja estis tre lacaj kaj dormemaj. Tiaj estas katoj, kredu min, mi havis multajn!

Sed la rava rato, la belege blanka beluleto, kuris tien kaj reen sur la tablotuko sur la supro de la manĝotablo. Li, ĉar li ne estis ŝi, kolektis manĝaĵon por si mem. Precipe kiam la familio manĝis

biskvitojn la rava rato estis tre okupita kaj feliĉega. Li prenis tutan biskviton per sia malgranda buŝo, fakte buŝeto, kaj saltis de la tablo al sur la breto sur la muro. Meze sur tiu breto staris la eta hejmo de la rava rato. Li havis sian propran pordeton tra kiu li devis eniri por fine esti hejme. Sed kun la grandega biskvito en la buŝo estis treege malfacilege por la rava rato eniri sian hejmon. La biskvito certe ne permesis al li eniron ĉar ĝi ja estis pli granda ol la enirejo. Do, kion faras saĝa kaj rava rato? Li revenas la tutan longan vojon al la supro de la manĝotablo kaj petas al unu el la gepatroj ĉu tiu bonvolos rompi la biskviton por ke la rava rato povu iri hejmen kaj manĝi ĝin. Tion faris eĉ tre volonte kiu ajn el la du gepatroj, kaj baldaŭ la ravuleto povis sidi en sia privata hejmo ĝuante sian bongustan matenmanĝaĵon.

Sed meze de tiu idilia etoso okazis io kio sendube ridigos vin, mia kara legant(in)o, ĉar vere okazis io tute kaj tre eksterordinara.

El la kuirejo en la sidoĉambron eniris grandega blanka porko. Liaj du okuloj petante rigardis en la okulojn de la du gepatroj. La okuloj estis eĉ tre facile kompreneblaj; ili diris: "Karaj du bonaj homoj, ĉu vi bonvolas helpi min? Miaj mastroj intencas mortbati kaj manĝaĉegi min!"

La du gepatroj rigardis unu la alian. Tiam ili rigardis rekte en la malgrandajn okulojn de la grandega

porko. Bonvolu ne forgesi ke porkoj ĉiam parolas per siaj belegaj okuloj. Al tiu ĉarmega vizaĝo de la senhelpa kaj endanĝerigita porko estis kompreneble ne eble rifuzi ion ajn. La porko kompreneble ne sciis ĉu ili helpos ĝin aŭ ne. Ĝi provis kaŝi sin sub la tablo, sed ĝi estis tro grandega por kaŝi sin ie ajn. Tiam la patro diris: "Bonega kaj grandega porko, eĉ porkego. Kiu povus ne ami vin? Vi estas ja belega kaj vi havas bonan koron. Kompreneble ni helpos vin! Ni havas malplenan porkejon en la malantaŭa ĝardeno. Ni disponigos ĝin al vi por la cetera parto de via surtera vivo. Neniu scias ke vi loĝos tie. Dum manĝotempoj vi eniros ĉi tiun sidoĉambron kune kun ni kaj la du filetoj, la du katoj, unu el kiuj estas nigra kaj la alia estas testudkolora. Krom tio vi rajtas amikiĝi ankaŭ kun la ĉarmega, rava rato, kies nomon mi estas forgesinta. Sed vi rajtas nomi lin kion ajn ĉar vi estas ja eĉ tre inteligenta besto kun ĉarmegaj vizago kaj okuloj!"

Kaj la grandega porkego ploregis larmojn de ĝojo kaj feliĉo kaj ĉirkaŭbrakis la du gepatrojn, la du filetojn, la du katojn kaj la etan, ĉarman kaj ravan blankan raton. Nun ankaŭ ĝi estis membro de la feliĉega familio. Ĉar kiel diras la malnova proverbo: "Faru bonon, kaj via familio pligrandiĝos!"

La patro de la familio eliris en la ĝardenon. Li rigardis ĉirkaŭen kaj vidis du virojn, mi certe ne

povas nomi ilin sinjoroj. Ili ambaŭ kunportis longajn dikajn bastonojn. Iliaj kruelaj okuloj rigardis ĉiun direkton, ĉar fakte ili serĉis la forkurintan bonkoran porkon. Ilia intenco estis mortbati ĝin kaj poste manĝegaĉi ĝin.

Sed tio kompreneble ne okazis ĉar ankoraŭ estas justeco en la mondo. Eĉ en tiu ĉi mondo! La grandega porkego ĝisvivis la finon de sia feliĉa vivo parte en sia propra hejmo en la ĝardeno kaj parte kune kun la bonkora familio en la mueleja dometo. Multajn jarojn poste la grandega porkego forlasis sian tiam eluzitan korpon kaj la patro de la bonkora familio plorante enterigis ĝin en la ĝardenon. Neniu sciis ion ajn pri la tuta afero ĉar ordinaraĵ homoj ankoraŭ ne estas sufiĉe maturaj por kompreni tiajn aferojn!

Jarojn poste la familio, nun sen sia adoptita kaj amata porkofilo, elmigris al tute alia kontinento kie oni certe ne akceptus la patron kiel kokiniston. Li do iĝis ordinara laboristo. Liaj du filoj plenkreskiĝis kaj forlasis lin, lia edzino forpasis, kaj la du katoj kaj la rava blanka rato estis elkarniĝintaj en Anglujo multajn jarojn antaŭe. Nun li estis tute sola escepte de unu malgranda blanka hundo. Kiu povas diveni kiu ĝi estis multajn jarojn antaŭe? Sed iun belan tagon, fakte en la somero, alvenis al la pordo de la ekskokinisto junulo belege vestita, kaj tio estas io tre eksterordinara en la lando en

kiu nun loĝis la iama kokinisto.

La junulo sin prezentis dirante: "Vi verŝajne ne memoras min. Iam, antaŭ multe da jaroj, mi iĝis via filo. Mi estis en Anglujo morte persekutata de du viroj kiuj volis mortbati kaj manĝegaĉi min. Mi venis al via domo kaj petis kompaton, kaj vi kaj via bonkora familio akceptis min kaj zorgis pri mi ĝis la fino de miaj tiamaj tagoj. Mi restas ĉiame dankema al vi ĉiuj! Post la fino de mia surtera vivo, mi eniris en la Spiritan Mondon kie mi ankoraŭ loĝas. Mia gardanta spirito hieraŭ diris al mi ke mi devus iri saluti vin kaj doni al vi ion kio povas plibonigi kaj plifaciligi viajn restantajn jarojn en la Materia Mondo. Bonvolu akcepti ĉi tiun ĉekon de \$500 000 por ke ankaŭ vi povu ĝui feliĉajn ceterajn jarojn de via vivo! Eble vi povas eĉ iri kaj partopreni iun el la bonegaj Universalaj Kongresoj de Esperanto sur la Tero!"

La ekskokinisto provis esprimi siajn sincerajn kaj elkorajn dankojn, eĉ dankegojn, sed la belvestita junulo estis jam elfaldinta siajn pure blankajn flugilojn kaj survojis al sia hejmo en la Spiritita Mondo. Kun malsekaj okuloj la ekskokinisto rigardis la puran spiriton ĝis ĝi subite malaperis malantaŭ grandega nuboj.

Kia diferenco inter filozofio kaj religio?

PAUL DESAILLY (ADELAJDO)



Diversaj ideoj el mia vidpunkto pri Aksa Epoko de T. Steele (<http://esperanto.cri.cn/other/magazine/201305073.pdf>) kiu ne estas ateisto.

En nia tre malsana mondo validigi ateismon per antikva egipta hieroglifo (kiel ekzemple per sola skribaĉaĵo de unu laboristo petante, 'Estas la dioj realaj?') por pruvi endemian ateismon en antikvo estas por seriozaj pensuloj nekredinde kaj preteratentas la monoteismon proklamitan en Nilo-delta de Izraelidoj en diversaj epokoj. 'Ne,' estas la mallonga respondo, 'la dioj ne estas realaj, sed Dio ja estas.' Sugesti ke Sokrato, Platono kaj aliaj estis aŭ ne-kredantoj aŭ agnostikuloj kaj ke la unua estis mortigita por esti ateisto estas krude erara interpreto nekontesteble refutita sur paĝoj 39 - 47 de *PROOF - for the lay person* (*PRUVO - por laiko.*) (<https://gumroad.com/RRSCR>). Por kontraŭstari politeismon kaj por 'korupti junulojn

de Ateno' pri monoteismo, Sokrato estis akuzita antaŭ la Areopago kaj kondamnita al morto per veneno (vidu bildon).

Dum jarmiloj la firma bazo de okcidenta leĝaro, nia moraleco, kaj eĉ nia pensmaniero devenas de la sankta *Biblio* kaj de la greka filozofio. Laŭ mi, bahaa laiko, la esenca diferenco inter tiuj kristalklare kuŝas en tio ke la ĝusta kaj la malĝusta venas el la menso de aŭ (1) la dio(j) aŭ (2) la homo. Interese nuntempe, amaskomunikiloj por scii kio estas ĝusta kaj malĝusta evitas ekleziojn kaj turnas sin kutime al etikistoj, kaj al la scienco de la etiko referencas kvazaŭ konfirmi ke jes ja tio kio (mal)ĝustas estas elpensajo de la homo.

Tiom fama estis Grekujo kaj ties steluloj de la praaĵ tempoj ke filozofoj de la moderna epoko laŭgrade imitas ilin samkiel vortaroj ne nur de eŭropaj lingvoj honore utiligas iliajn nomojn: Sokrata ironio, Sokrata metodo, Platona amo, Hipokrata juro, Aristotela logiko, Pitagora teoremo ktp.

Simila situacio daŭras en la Oriento rilate al Konfuceo, Menceo, kaj Lao Tseo. Ŝajnas ke, kvankam la fondintoj de Konfucianismo kaj de Taoismo estis samtempuloj, ili neniam vid-al-vide renkontiĝis

– bedaŭrinde. Hodiaŭ disĉiploj de Konfuceo (kaj de la Budho) kverletas inter si ĉu jes aŭ ne Li kredis je dio(j). Laŭ Trevor Steele, la Budho ‘simple ne volis pensi pri tiaj temoj’ kaj ‘se ili ekzistas, la plej bona servado al ili estas servi al niaj kunhomoj kun respekto kaj malavaro’. Ne kontesteble, tamen, Konfuceo konstante aludis verke la ĉielon kien ĉiuj tiam en Ĉinujo (kaj multloke) sin celis kaj rekonis kiel la Loĝejon de la dio(j). Alivorte, en tiu socio antaŭ 2500 jaroj preskaŭ ĉiuj kredis je dio(j). Parenteze, kion diri pri la stato de nia socio kaj pri la bahaa elirpunkto: la unuan fojon en la historio la ekzisto de Dio el logika rezonado estas pruvebla! Bahá’u’llah (1817-1892) (*paĝo. 9-10), la fondinto de Bahaismo, klarigis ke ĉiu persono en tiu ĉi ciklo povas rekoni la belecon de Dio. Alikaze, la Kreinto ne rajtus postuli de ni raporton pri niaj mankoj kaj pekoj.

El la bahaa tekstaro ni konstatas ke Budho kaj Kristo k.a. estas disenditoj, t.e. laŭ bahaa termino, manifestiĝoj de Dio, (*paĝo 5) sed Konfuceo estis fondinto de morala sistemo kaj granda reformisto. (Pri ĉi-ĉio danke al Lidia Zamenhof la diferencoj facile troveblas modelstile en la Internacia Lingvo; vidu sube). Kvankam inter la historiistaro abundas opinioj pri la intelekta kaj spirita rango de Budho, Kristo, Konfuceo, Sokrato k.a. konfirmas mia religio la aserton de Trevor kiu priskribas Sokraton: ‘Eterne li restos la filozofo de la okcidenta

mondo.’ Bahá’u’lláh kvar elstarajn paragrafojn dediĉas al Sokrato en *Lawh-i-Hikmat* (el la persa – Tabuleto de Saĝeco.): ‘Li estas la plej eminenta el ĉiuj filozofoj kaj pri la saĝeco ekstreme kvalifikita.’ (*PROOF*, paĝoj 101-109.)

Deflankiĝa kaj ŝokiga komentario sekvas por ke en la pleneco de tempo ni daŭrigu interkonsultadon pri egale gravaj simil-temaj aferoj:

(a) “Rilate al via demando pri la historio de la filozofoj : la historio antaŭ Aleksandro el Grekujo estas konfuzega, konsiderante la fakton ke nur post Aleksandro la historio ja iĝas ordigita kaj sistemigita disciplino...Kiom da foje historia fakto kredendis en la 18-a jarcento, dum la malo estis pruvita en la 19-a...” Kaj, “...la historiistoj el Oriento kaj Okcidento estas tre reciproke disigitaj. Krome, *la Torao*, konsiderata kiel la plej pratempa historio, ekzistas hodiaŭ je tri apartigitaj versioj : la Hebrea, agnoskite aŭtenta, kaj de Judoj kaj de Protestanta pastraro; la Greka Septuaginto, kiu estas uzata kiel aŭtoritato de grekaj kaj aliaj orientaj eklezioj, kaj la Samaritana *Torao*, la modela aŭtoritato por tiu popolo. Tiuj ĉi tri versioj reciproke malsimilegas, eĉ rilate la tempojn de la plej famaj figuroj.” Vidu paĝojn 48 kaj 49 de *PROOF* citita supre.

Kavaliro ‘Abdu’l Bahá, (1844 – 1921) (*paĝo 10-11)

(b) “Fine dank’ al araboj la civilizacio enradikiĝis en la Okcidento. Ili prezentis al Eŭropo filozofion, kulturon kaj sciencojn de

praaj grekoj elpensitaj. Araboj estis la plej kompetentaj tradukistoj kaj lingvistoj de sia epoko. Danke al ili la skriboj de famaj pensantoj, i.a. Sokrato, Platono kaj Aristotelo iĝis konataj de okcidentanoj.”

(Oficiale je la nomo de la Gardanto de Bahaismo, Shoghi Effendi (1897–1957) (*paĝo 11) la 27-an de aprilo 1936 kuntekste de demando pri la Renesanco.)

(c) Demando al ‘Abdu’l Bahá sur paĝo 164 de *Some Answered Questions, (Respondoj kaj Demandoj)* Esperantigita de Lidia Zamenhof (*paĝo 29) en la ĉapitro *Du Klasoj de Profetoj*:

‘Al kiu kategorio apartenas Budho kaj Konfuceo?

Respondo. – Budho ankaŭ fondis novan religion, kaj Konfuceo renovigis la moralecon kaj la malnovajn virtojn, sed iliaj institucioj estas tute ruinigitaj. La kredaĵoj kaj ritoj de la budhanoj kaj konfucianoj ne estis daŭrigataj konforme al iliaj fundamentaj instruoj. La fondinto de Budhismo estis mirinda persono. Li konfirmis la Unuecon de Dio, sed poste la originalaj principoj de liaj doktrinoj iom post iom malaperis, ignorecaj kutimoj kaj ceremonioj ekestis kaj kreskis, ĝis fine ili finiĝis per adorado de statuoj kaj bildoj.

Konsideru ankaŭ: Kristo multfoje ripetis ke oni devas obei la dek ordonojn de la Pentateŭko kaj li insistis ke ili estu konservataj. Inter la dek ordonoj estas unu, kiu diras: “Ne faru al vi idolon, nek bildon”. Nune en kelkaj kristanaj preĝejoj

estas multaj statuoj kaj bildoj. Estas do klare kaj evidente, ke la religio de Dio ne konservis siajn originalajn principojn inter homoj, sed ke ĝi grade ŝanĝadis sin kaj aliiĝadis, ĝis ĝi tute ruiniĝis kaj neniigis. Pro tio la revelacio estas renovigita kaj nova religio estas fondita. Sed se la religio ne ŝanĝiĝus kaj ne aliiĝus, la renovigo ne estus bezonata.

En la komenco la arbo estis en sia tuta beleco, kaj plena de floroj kaj fruktoj, sed poste ĝi maljuniĝis kaj senfruktiĝis, ĝi velkis kaj sekiĝis. Pro tio la Vera Ĝardenisto plantas denove senkomparan junan arbon de la sama gento kaj speco, kiu kreskas kaj disvolviĝas tagon post tago, vaste ombrigas la dian ĝardenon kaj kreskigas mirindajn fruktojn. Same estas kun la religioj; kiam la tempo pasas, ili deflankiĝas de sia originala fundamento, la vero de la religio de Dio tute malaperas, kaj ĝia spirito ne restas plu en ĝi; naskiĝas herezoj, kaj ĝi iĝas korpo sen animo. Pro ĉi tio ĝi estas renovigata.’

Jen do gesamideanoj ree al mia ĉefa punktaro se la ĉi supraj linioj ne sufiĉas. Ĉar multaj okcidentanoj hodiaŭ apogas siajn moralojn kaj etikojn sur la ŝultroj de modernaj filozofoj kaj etikistoj, kies klarigoj ofte estas serioze miskomprenataj kaj fakte samlokiĝas ĉe la radikoj en antikva Ateno, mi rajtas menciigi ke Trevor subtaksas la geografiajn kaj ideologiajn limojn de la Sokrata lumturo. Ke la jena okulfrapa klarigo de la tuta afero restas ĝis nun apenaŭ konata estas problemo portempa:

‘Moseo starigis la religian leĝon kaj la civilan leĝon; tiuj ĉi donis vivon al la popolo de Izraelo kaj kondukis ĝin al la plej alta ebla grado de civilizacio de tiu periodo. Ili atingis la staton de tia progreso, ke la saĝuloj de Grekujo venadis vidi la famulojn de Izraelo, kiel modelojn de perfekteco. Inter ili estis Sokrato, kiu vizitis Sirion kaj transprenis de la idoj de Izraelo la instruojn pri la Unueco de Dio kaj pri la senmorteco de animo. Post la reveno en Grekujon li diskonigadis tiujn ĉi instruojn. Poste la popolo de Grekujo ekstaris kontraŭ li, akuzis lin pri malpieco, kulpigis antaŭ la Areopago kaj kondamnis je morto per veneno.’ - Abdu’l-Bahá *Some Answered Questions*, paĝo 14

Aliloke Abdu’l-Bahá simile al situacio pri miskomprenoj r.a. *La Torao* klarigas:

(d) ‘Dum la splendaĵo de la regno de Solomono judaj sciencoj kaj artoj tiagrade sukcesis ĝis eĉ grekaj filozofoj vojaĝis al Jerusalemo por lerni de hebreaj saĝuloj la fundamenton de la izraela leĝaro. Laŭ la historio de la Oriento ĉi ĉio estas fakto nekontestebla. Sokrato mem vizitis en la Sankta Lando judajn doktorojn kun kiuj li interkonsiliĝis por pridiskuti la principojn kaj fundamenton de ilia religio.’ *BWF* paĝo 272.

‘La fonto de ĉiu lernado estas la rekono de Dio, ekzaltita estu Lia Gloro, kaj la sola rimedo ĝin akiri venas de la scio de Lia Dia Manifestiĝo.’ - Bahá’u’lláh

ESK | paĝo 12 | 123 | junio 2016

JEN LA VERA SIGNIFO DE LA UNUECO DE DIO KAJ DE REENKARNIĜO: LA MANIFESTIĜOJ DE DIO Ekz. Budho, Kristo kaj Mahometo



Iusence, gekaraj, neniu diferenco inter filozofio kaj religio ekzistas ĉar filozofio esence dependas de religio! Budho kaj Kristo estis Disenditoj, t.e. manifestiĝoj de Dio; Sokrato kaj Konfuceo verdire estis elstaraj filozofoj!

(*) = Almanako Lorenz (www.spiritismo.org/lorenz)

Larĝdentaj ratoj invadas Kennedy Vojon

HENRIKO BROADBENT (VIKTORIO)

Mia edzino, Betty, kaj mi loĝas proksime al la marbordo ĉe malgranda vilaĝo kiu estas nomata Somers. Ĝi superrigardas la Insulon de Phillip en suda Viktorio. Sur la kruta deklivo aŭ klifo super la strando vivas malgrandaj ratoj. La tieaj loĝantoj nomas ilin “Marĉa Rato”. Mi nur iam vidis unu raton en la krepuska lumo de frua mateno. Tamen, mi ofte vidis iliajn malgrandajn tranĉeojn kiujn ili fosas ĉe la surfaco de la grundo dum ili serĉas radikojn por manĝi.

Antaŭ kelkaj monatoj mi observis terneston sub la stumpo de pinarbo kiun homoj detranĉis por ni antaŭ proksimume dek jaroj. Ho, mi pensis, la kunikloj estas ĉi tie. Mi kaptos ilin kaj metos ilin en la kuirpoton. Do, mi faris dratorettubon kun kaptila pordo kaj metis ĝin ĉe la eniro de ilia ternesto. En la mateno mi piediris al la stumpo. Mi trovis ke la malgrandaj bestoj ignoris min kaj duonenterigis la kaptilan dratrettubon el ilia nova domo. Evidente ili estis tro malgrandaj por movi la ellasilon. Do, ili ne estas kunikloj, mi deduktis. (La vera kialo estas, kompreneble, ke mi ne konstruis bonan ellasilon.)

Tamen mi serĉis la ĉirkaŭaĵon kaj trovis multajn malgrandajn tranĉeojn kie la ratoj fosis por trovi radikojn por nutraĵo. Post kelkaj tagoj mi piediris laŭ la vojo al ĝia norda fino. Tie mi

ankaŭ trovis alian terneston. En la vojo al la norda fino mi trovis pli da tuneloj kie la ratoj fosis por radikoj. Do, ni havis ratojn laŭ la tuta longeco de Kennedy Vojo, mi pensis.

Nun, kiel mi antaŭe skribis, la tieaj loĝantoj nomis la bestojn, kiuj loĝas laŭ la deklivo, “marĉratoj”. Tamen, marĉratoj vivas en la apudaj botanikaj ĝardenoj ĉe Cranbourne. Ili estas tre impertinentaj bestoj, grandaj, korpulentaj kun longaj vostoĵ. Bernie serĉis sian libron kaj trovis malgrandan raton tian kian la beston kiun mi vidis en tiu krepuska mateno. La nomo de la rato estas “Larĝdenta Rato”. Ĝi estas indiĝeno de Aŭstralio kaj ekzistas nur ĉi tie kaj iomete je ambaŭ flankoj de Somers, laŭ la libreto de Bernie. Tamen, la interreto informas nin ke ĝi loĝas ankaŭ en montaj areoj de Viktorio kaj Novsudkimrujo kaj vivas sub la neĝo dum la vintro.



















Ri, li, ŝi ...

SANDOR MONOSTORI (VIKTORIO)

Ekzistas multaj lingvoj, inter aliaj kelkaj el la ural-altaja lingvo-familio en kiuj ne estas gramatika diferenco inter la seksoj. La tria persona pronomo samas por li kaj ŝi, ekzemple turke o, hungare ő, finne hän, mongole тэр, maorie kaj samoe ia, süahele yeye, taĝike y, kaj uzbege u.

Eble tio ŝajnas konfuza por homoj kiuj konas nur hindo-eŭropajn lingvojn. Imagu ĉi tiun situacion: Peter kaj Mary iras al restoracio. Li manĝas fiŝaĵon kaj ŝi manĝas viandon. “Li” kaj “ŝi” klare montras la ĝustan personon. Tamen, se Peter kaj John kunmanĝas oni ne povas distingi ilin per la personaj pronomoj. Krom la ural-altajaj lingvoj, ankaŭ kelkaj hindo-eŭropaj lingvoj povas intence eviti la esprimon de la sekso de la subjekto. En la hispana lingvo la verba konjugacia finaĵo klare montras ĉu temas pri unua, dua, aŭ tria persono, singularo aŭ plural; tial, li (él) kaj ŝi (ella) kutime ne aperas en la frazoj.

Ĉi tiu konversacio okazis en hispana filmo: virino diras al siaj filinoj: “Tengo un nuevo amor.” (Mi havas novan amon.) “Es más joven que yo.” (Estas pli juna ol mi.) La filmo intence uzis ambaŭsencajn frazojn por fari surprizon, ĉar la nova amanto estis virino. Hispane la frazoj ne sonas strangaj. Traduki la situacion en la anglan eblas nur tre strange: “I have a new love. He or she is younger than me.” Same la frazo sonus strange Esperante: “Li aŭ ŝi estas pli juna ol mi.”

Ĉiuj lingvoj havas foje malklarajn esprimojn kaj ofte tion uzas ŝercoj kiuj ne tradukeblas al aliaj lingvoj.

Esperanto estas viva lingvo, kaj la origina gramatiko iom ŝanĝiĝis dum la lasta jarcento: “ci” praktike malaperis; la plimulto de esperantistoj uzas -io anstataŭ -ujo je la fino de landnomoj. Ĉu “ri” estas nur nuntempa modo aŭ daŭre iĝos parto de Esperanto decidos la uzantaro.

Pri la uzado de ‘ri’

JOANNE JOHNS (MELBURNO)

Estis multaj plendoj pri la uzo de “ri” en ESK 121 kaj eĉ la aserto ke “kiam ajn ni ekvidas alian personon, ni tuj rimarkas ĉu tiu estas viro aŭ virino.” Surprizus min se la verkinto de tiu frazo vere neniam vidis personon, kiu malfacile eniras en

unu el tiuj du kategorioj (kaj mi eĉ ne tuŝos ties aserton ke genro sugestas kiel ni interrilatu kun iu). Genro estas kompleksa temo malofte preparolata, kaj multaj homoj en la mondo havas internan senton pri sia genro, kiu ne kongruas al sia biologia genro. Eĉ se

la sento ne estas tute inversa, virino povas senti sin pli vire ol aliaj virinoj, kaj viro povas senti sin pli virine (aŭ malpli vire) ol aliaj viroj. Kelkaj homoj sentas sin nek vire nek virine. Kelkaj sentas sin vire iun tagon kaj virine la venontan. Kaj estas grave noti ke ĉi tio havas neniun rilaton al onia preferata genro de koramiko. Resume, oni tute ne povas konstati el ekvido kie persono situas en la skalo de genro.

Sed pri la lingvo mem: jes mi akceptas ke, se la afero nur temus pri la evito de mencio de genro, oni povas fari ĝin per la nun haveblaj kaj fiere fundamentaj vortoj. Sed ĉu tiuj vere taŭgas por esti la plej ĝentila? Viro verŝajne ne ŝatus se homoj konstante nomus lin “ŝi”. Same, “ĝi”, “li (celita

esti sengenra formo, sed ne eviteble virŝajna)”, “tiu” kajeĉ “ŝli” eble havas aliajn signifojn kiuj povus ofendi.

Mi kredas ke nur homoj kiuj povas havi validan opinion estas tiuj kiujn la lingvo afekcias. Mi ĉeestis la pasintan IJK-on en Germanujo, kaj tie oni petis ke ĉiuj skribu sian preferatan pronomon sur nomŝildo. La nura ebleco, kiun mi vidis, krom la kutimaj du, estis “ri”. Kelkaj homoj preferis tion kaj, laŭ mia sperto, ĉiuj aliaj estis respektmaj kaj nomis tiujn kiuj deziris esti “ri” ĝuste tiel.

Flanke, mi ne konsentas pri la originala propono de “ri” ke ĝi anstataŭigu “li” kaj “ŝi”, sed ŝajnas ke la tri nun jam bone kunlaboras, almenaŭ inter la junuloj.

Rimarko de la redaktisto: *Dankon al ĉiuj kiuj kontribuis al la debato pri la uzo de “ri”. Mi kredas ke debato pri ĉi tiu temo nun sufiĉis. Ĉu iu volas proponi alian gramatikan temon por diskuto?*

Opinioj de maljuna spertulo

BOB FELBY (ADELAJDO)

Viro antaŭ longe forlasis sian naskiĝlandon kaj iris loĝi en Aŭstralio. Eble li naive kredis la broŝurojn pri tiu granda lando, kiuj mensoge informis ke en Aŭstralio ĉiuj egalas.

Do alveninte li baldaŭ trovis ke almenaŭ li ne estas egala. Kiam li iris serĉi laboron, alia laborserĉanto estis ĉiam pli preferata ol li.

Tiam li pensis: “eble pli bone estus iĝi aŭstraliano”. Li estis tuj akceptita de iu urbestro de

antaŭurbo de Adelajdo. Kiam li refoje serĉis laboron oni demandis al kiu nacieco li apartenas. Ĉar li vere estis verema li respondis: “mi estas aŭstraliano”. Li estis nun preskaŭ certa ke li ricevos bonan laboron. Sed kompreneble ne. La sekva demando estis: “En kiu lando vi naskiĝis?” Li respondis: “En Danujo”. Post iom da parolado, la intervjuanto informis lin ke estas neniu laboro por li en Aŭstralio.

Sed kiel optimisto kaj esperantisto

li ne perdis la esperon. En iu granda fabriko oni serĉis noktogardiston. Ĉar nia viro jam pli ol dek kvin jarojn laboris kiel noktogardisto en Kopenhago, li iris tien por peti la postenon kiel noktogardisto. Kiam li alvenis tien la ĉambrego estis jam plenplena de laborserĉantoj. Li sin sidigis kaj atendis. Unu post la alia la laborserĉantoj estis vokitaj por mallonga intervjuo. Kelkajn horojn poste atendis nur du viroj. Unu matura viro kun multe da sperto pri la devoj de noktogardisto, kaj alia kun neniuj spertoj, nek pri laboro nek pri noktogardado.

Oni vokis la du samtempe. La maturan spertulon oni simple ignoris kaj pridemandis la alian, kiu sciis nenion pri la laboro, kiun li, pro iu nekonata kaŭzo, bezonis. Sed ĉar evidentiĝis ke li estis eksoficiro en la glora aŭstralia mararmeo oni tuj dungis lin. La alian viron, kun multege da spertoj pri la laboro bezonata, oni tute ignoris. Eble oni deziris viron kiu tre ŝatas vundi kaj mortigi aliajn homojn, mi ne scias. Sed tiu bona viro, kiu biciklis eĉ tre longan distancon por la intervjuo kaj atendis tutan tagon en la fabriko, devis nun rebicikli hejmen, manĝi iom da nutraĵo kaj kompreneble ne dorminte la tutan tagon reiri al sia noktolaboro en kotonŝpinejo. Li sin demandis: “Kial mi iĝis aŭstraliano? Mi certe ne fieras pro tiu eraro!”.

Pasis jaroj kaj eĉ iom pli. Post longa atendado li neatendite trovis

elteneblan laboron, sed neniam li trovis egalecon en Aŭstralio.

Kelkajn jarojn poste, post kiam li iĝis pensiulo, la aŭstralianoj erare elektis la malĝustan registaron. Rezulte de la erarelekto la pensiuloj perdis ĉiusemajne \$80.00. Gepatroj devis pagi grandegan monsumon al la registaro por ke siaj infanoj ricevu edukadon. La infanoj estis devigataj kvin tagojn ĉiun semajnon pasigi en lernejo por lerni, kvankam la geinstruistoj ne estis kapablaj bone instrui. Sed ne nur tio. Oni nun devigas la infanojn iri al la lernejo, samtempe devigante la gepatrojn pagi ege altajn sumojn da mono por lernolibroj, librosakoj kaj uniformoj, kvazaŭ ankaŭ la infanoj devus aspekti kiel soldatoj. Estas eĉ tre malfacile kompreni kiel funkcias, aŭ eble mi devus diri, malfunkcias, la cerboj de la riĉuloj en Aŭstralio. Do post dek du aŭ dek kvin jaroj en la lernejo ili eniras en la veran vivon nenion lerninte. Sed ni ne forgesu ke la plej bonaj el ili estas persekutataj kaj batataj de malgranda aro da etaj frenezuloj, kiuj evidente rajtas bati aliajn lernantojn. Almenaŭ nek la instruistoj nek la lernejestro faras ion ajn por kontraŭbatali la batemulojn! Kiel ordinaraĵ bonaj infanoj povas lerni ion ajn en tiaj lernejoj? Jen demando respondinda, ĉu ne?

Aŭstralio estas bone konata pro la fakto ke en ĝi loĝas multaj malsanuloj. Tre multaj, fakte tro multaj. La nova registaro do tuj

decidis malfermi la plej multajn el la malsanulejoj kaj devigi la malsanulojn atendi sep ĝis 11 jarojn por eĉ tre necesaj operacioj. Evidente la registaro, precipe la ĉefministro kaj la ministro pri financoj volas ke kaj malsanuloj kaj maljunuloj mortu pro malsano kaj malsato, por ŝpari monon kiu, laŭ la fiopiniaĉo de la registaro povus esti pli bone elspezata por murdado kaj detruado en fremdaj landoj, ĉu ne?

Nia viro nun demandis sin “kial mi venis ĉi tien?”. En Danujo oni ne pagas por frekventi lernejojn. Oni ne pagas la lernolibrojn, oni ne surhavas uniformojn, ĉar la ĝenerala

publiko certe ne adoras, nek admiras la sangokovritan murdado kaj detruado de aliaj homoj, kiuj ne estas danoj. Kial la aŭstralianoj ne postulas homameman registaron anstataŭ ĉi tiun tute ne kapablan?

En Danujo oni ne pagas por eniri malsanulejon. Oni ne pagas por studi kaj lerni en universitatoj. Kaj oni ne devigas iun ajn surmeti sur sin uniformojn. Oni ne kuraĝigas iun ajn admiri murdistojn, kaj oni certe ne preferas nespertulon por serioza noktogardado al nesperta eksoficiro de la mararmeo!

Ĉu renkonti la vjolon?

BARB WILLIAMS (MELBURNO)

Unu el la plej belsonaj tipoj de muzik-instrumentoj de la Renesanco estas la vjol-familio. Ĝi entenas ĉefe tri specojn: sopran-, tenor-, kaj bas-vjolon. La basvjolo similas al violonĉelo je grandeco. Oni kunludas ilin en ‘ensemble’ de 3, 4, 5, aŭ 6 partoj, ĉiu parto unuope, kiel ĉambra muziko. Vjoloj ankaŭ belsonas kun ĉi tiaj: voĉo, liuto, teorbo, klavicens, orgeno, harpo ktp.

Tielnome, itale ‘viola da gamba’ signifas ke oni tenas ĉiujn specojn de vjoloj vertikale, inter la kruroj. Do, la arĉo moviĝas horizontale trans la korpo. Kontraste, pri la violono, angle ‘violin’, oni tenas ĝin horizontale kaj antaŭe, apud

la maldekstra ŝultro.

Vjolo pli rilatas al liuto kaj gitaro ol modernaj kordinstrumentoj: ĝi havas (moveblajn) fretojn, kaj la agordon (angle ‘tuning’) uzas kvartojn kaj unu triton. Violonoj ne uzas fretojn, kaj agordiĝas kvinte. Vjoloj havas 6 kordojn el ŝafintestoj, violonoj havas 4, pli ofte fabrikitaĵn el metalo. Kompreneble, la sono malsamas.

(Tamen, pratempe, la violono teniĝis pli malalte al nun, ĉe la brusto, for de la mentono. Tiame, ĝi ankaŭ uzis kordojn el ŝafintestoj, malaltan ponton, kaj malpli streĉecon. Iuj kiuj deziras historian sonon nun uzas tian tipon.)

Iuj kiuj kantadas en ĥoroj, speciale kristanaj ĥoroj, aŭ kantas madrigalojn, ofte konas muzikaĵojn de vjол-komponistoj: ekzemple Byrd, Gibbons, Dowland, Morley, Purcell. Aliaj estas Jenkins, Lawes, Ferrabosco, Coperario, East ktp.

Oni ludas ensemble: fantaziojn, kanzonojn, fugojn, dancojn - kiel pavano, gajlardo, sarabando ktp. Grandega trezoro ekzistas por ludi!

Dum la 1700aj jaroj, floregis basvjola solo-literaturo por amuzi la francan 'Sun-Reĝon', Louis dek-kvara (Louis XIV) ĉe Parizo kaj Versaĵo. Eble vi konas la filmon el la 1990aj jaroj nomitan france 'Tous les Matins du Monde' (Ĉiuj matenoj de la mondo): ĝi popularigis solo-basvjolan muzikon de la fama virtuoza Marin Marais kaj lia instruisto 'Le Sieur de Sainte Colombe'. Majstro Jordi Savall, hispano, nuntempa virtuoza, ludis grandan sepkordan basvjolon – tre bele. (Fakte, neniu certas pri la identeco de la Sinjoro de Sankta-Kolombo, nur ke li komponis mirindajn kaj amegatajn muzikaĵojn.)

Ankaŭ dum la 1700aj jaroj, aristokrataj francaj virinoj deziris ludi la novan italan solo-violon-muzikon de Corelli, Geminiani ktp. Socia etiketo malpermesis ke oni ludu violonon, tro kruda pozo! kaj ĝi malgraciigis la vestaĵon ... do, la parizaj fabrikistoj de instrumentoj faris eĉ pli malgrandan vjolon 'pardessus de viole' kun alt-G kordo,

por plaĉi ali ili! Literaturo saltis por ĉi tia instrumento. Kompreneble, ĉio menciita tute haltis je la Franca Revolucio. Ni nun ĵus retrovas ilin.

Nia grupo de geamikoj-‘gambistoj’ ludas semajne, pli ofte kiel sesteto. La ludtekniko sufiĉe similas ke multaj uloj povas ludi ĉiujn vjол-specojn, malgraŭ la malsama grandeco. Ĉiuj en nia grupo ludas almenaŭ 2 specojn, aliaj ĉiujn speciojn.

Paske en Aŭstralio okazas nacia kurso-kunveno, organizata de volontuloj en la ĉefurboj, Brisbano, Sidnejo, Kanbero, nun ree la vico de Melburno en 2016. Ludantoj, junaj kaj maljunaj, entuziasme partoprenadas. (Vere, multaj el la maljunaj kunludas dum pli ol 30 jaroj.)

Vjolludado estas tre sociema aktivaĵo ĉar la kontraŭpunkt-konstruo de la komponitaĵoj iom similas al amika interparolo, almenaŭ muzikparolo. Se vi deziras aŭdi iom: (solistoj) Jordi Savall, Paulo Pandolfo, Mary Cyr, (ensembloj) 'Parthenia', 'Fretwork'.



Odoroj estas esprimeblaj per lingvo, kondiĉe ke oni parolas taŭgan lingvon

DONALD ROGERS (LOWER HUTT)

Tio estas traduko de la titolo de artikolo verkita de sciencistoj Asifa Majid kaj Niclas Burenhult¹. Ili skribis ke multaj homoj kredas ke estas malfacile priskribi odorojn per vortoj. Sed esploroj ĝenerale pritraktis nur okcidentajn urbanojn. Transkulturaj esploroj indikis ke ekzistas aliaj kulturoj kie odoroj ludas pli gravan rolon. Do, ili serĉis homgrupon por kiu ne estas tiel malfacile. Ili elektis la ĝehaĵojn (Jahai) de Malajzio, grupon de ĉasistoj-kolektistoj. Majid kaj Burenhult testis dek ĝehaĵajn virojn (nur unu kapablas legi) kaj komparis ties respondojn kun tiuj de dek angleparolantaj viroj samaĝaj en Austin, Teksaso, Usono.

La rezultoj montris ke la ĝehaĵoj povas paroli pri odoroj same facile kiel pri koloroj, dum anglalingvanoj parolas facile pri koloroj, sed malfacile pri odoroj.

La esploristoj analizis la respondojn por ĉiu lingvogrupo, notante ĉu ĉiu respondo estas abstrakta (ekzemple, blua, mucida), aŭ fontbazita (ekzemple folikolora, kiel banano), aŭ apreca (ekzemple bona, naŭza). Ili trovis ke la ĝehaĵoj uzis abstraktajn vortojn por kaj koloroj kaj odoroj. Ĉe anglalingvanoj abstraktaj vortoj dominis por koloroj sed estis raraj por odoroj; fontbazitaj klarigoj estis plej oftaj ĉe ili. Tamen, la aŭtoroj notis ke la klasifiko de vortoj kiel abstraktaj, fontbazitaj, aŭ aprecaj estas diskutinda.

Ili konkludis ke oni povas esprimi odorojn per lingvo se oni parolas taŭgan lingvon. Sed ĉu tiu konkludo de Majid kaj Burenhult estas la sola ebla konkludo? Ni scias ke iuj homoj

perceptas odorojn pli akute ol aliaj, kaj iuj specioj de besto havas multe pli akutan flarsenson ol homoj. La sensiveco de la flarsenso dependas de la genoj de la flaranto, kaj estas facile akcepti ke iuj homgrupoj pli akute flaras ol aliaj. Do, alternativa konkludo estus ke homoj kiuj pli akute perceptas odorojn, tiuj evoluigas pli ampleksan leksikon de abstraktaj vortoj pri odoroj.

La ĝehaĵoj havas leksikon de almenaŭ 12 vortoj pri odoroj. Per tiuj vortoj ili priparolas vastan gamon da odoroj. Ekzemple, ili havas vorton por priparoli la odoron de diversaj floroj, maturaj fruktoj, parfumo, sapo kaj la besto binturong. Alia vorto rilatas al laodoro de benzino, fumo, la fekaĵo de vespertoj, iuj miriapodoj, la radiko de zingibro, k.a.

Kiujn vortojn oni uzas en Esperanto por priskribi odorojn? En la esperanta korpuso ĉe Corpuseye² mi trovis kun la vortojodoro aŭ aromo kelkajn adjektivojn aprecajn: agrabla, bona, densa, forta, mirinda, mola, kaj ŝatita, kaj kelkajn kiuj temas pri la fonto: asperula, citronverbena, fraga, haringa, nuksa, kaj malmultajn abstraktajn: fetora, moska, putreca. Do, mi konkludas ke esperantistoj estas plejparte urbanoj, ne ĉasistoj-kolektistoj.

Referencoj:

1. *Odors are expressible in language, as long as you speak the right language*, Asifa Majid kaj Niclas Burenhult, http://pubman.mpg.de/pubman/item/escidoc:1752755:12/component/escidoc:1878134/Majid_Burenhult_2014_cogn.pdf

2. *Corpuseye*, <http://corp.hum.sdu.dk/cqp.eo.html>

La virino kaj la hundo

BOB FELBY (ADELAJDO)

Loĝis molkora virino tuj apud bela parko. Ŝi estis tre sola kaj ĝojis kiam, iun belan tagon, eta dolĉa kaj ĉarma hundido eniris ŝian vivon loĝante kune kun ŝi apud la belega parko.

Ŝi nomis la hundon Maksi, kaj baldaŭ poste aldonis al tiu nomo la finaĵon "mus", do Maksimus. Germaneparolantoj bonvolu ne konfuzi tion kun la germanaj vortoj "Maksi muss".

Kiel ĉiuj hundoj, ankaŭ Maksimus treege deziris iri promeni, kuri kaj ludi en la bela parko. Sed la molkora virino, aŭ ĉu pli bona vorto estas sinjorino? tute ne permesis tion. Ŝi pensis pli pri sia propra bonfarto kaj malpli pri tiu de la hundo.

La bona hundo do restis enkarcerigita en ŝia domo, en kiu ŝi manĝis, trinkis, dormis kaj malmanĝis, maltrinkis kaj de tempo al tempo vekigis.

Maksimus kaj la sinjorino tre amis unu la alian. Sed Maksimus, laŭ la pasado de la jaroj, pli kaj pli malsaniĝis. Tamen, li estis grandega hundo, sed dek ses jarojn poste, li estis ne nur malsana, sed ankaŭ malforta. Li vere bezonis iri en la parkon, sed la molkora sinjorino tion ne permesis.

Iun vesperon Maksimus estis tiom malforta ke li kolapsis sur la plankon. Li ekvomis kaj ekfekis tie.

La sinjorino purigis la plankon kaj Maksimus daŭrigis la vomadon kaj fekadon. Tio daŭris la tutan nokton. Je la sesa horo la sinjorino telefonis al unu el siaj najbaroj, kiu venis kaj helpis ŝin purigi ĉiun fojon kiam Maksimus malpurigis la plankon.

Fine sufiĉis la suferado. Makso estis tro malforta. La sinjorino telefonis al la "Societo kontraŭ al Bestoj". Venis sinjorino en granda aŭto. Ŝi prenis Maksimuson, enmetis lin en la aŭton, kaj forveturis kun li.

Kelkajn tagojn poste venis kolĉeno per la poŝto. La sinjorino ankoraŭ sidas sola hejme ploranta. Sed Maksimus nun ne plu ploras. Li nuntempe ludas en la ĉiela parko kune kun la ludemaj anĝeloj, kiuj bone komprenas ke al hundo necesas ludadi ekstere en la parko.




Kion mi faris post la trilanda kongreso

INDRANI BEHARRY-LALL (ADELAJDO)

Post adiaŭo al la postkongresaj ekskursanoj en la fluhaveno de Bandung, mi subite sentis min sola, kaj tuj devis komenci mem pensi!

Flugo al Medan, ege granda moderna flughaveno kaj per eĉ pli moderna trajno al la urbcentro, sed tiam... bruego, malpureco, ĥaosa trafiko, humida varmeco... ho, ve!! Mi volis fuĝi de Medan! Tial, la sekvantan matenon mi faris aranĝon por tuj vojaĝi al Bukit Lawang. Oni trompis min kaj mi devis pagi 4-foje pli ol necese, sed certe indus vojaĝi al tiu loko.

Oni alvenas al la strata, komerca flanko de la rivero kaj per ponto farita el ŝnuroj kaj rompitaĵ tabuloj oni atingas la arbaran flankon kie troviĝas loĝejoj, manĝejoj kaj ... la ĝangalo.



De tie dum la sekvantaj 2 tagoj mi iris kun gvidisto esplori la ĝangalon.

Ni vidis diversajn simiojn inkluzive de granda virorangutango kiu sidis en arbo manĝante foliojn de branĉoj kaj tiam farante neston por sia familio. Ankaŭ abundis multaj aliaj simioj.

Mia gvidisto ankaŭ montris diversajn plantojn kaj klarigis al mi pri ties uzoj.



Fakte, li donis al mi “simian medicinon” kontraŭ mia lakso (diareo). Tiu medicino estis folioj de normalaspekta arbo kaj ĝi bone ‘kuracis’ mian diareon kiam mia medicino de la apotekisto ne efikis! Poste mi floris en granda tubo sur la rivero ree al mia loĝejo!



Mi intencis iri al Berstagi por vidi vulkanojn sed, pro la fakto ke la plej facile atingebla vulkano komencis elĵeti gasojn kaj oni devis multe grimpi por vidi la alian, mi decidis ne iri tien ĉar mi iom vundis mian gambon dum la antaŭkongreso kaj ne bone povis grimpi. Do, rekte al la lago Toba. Tiu formiĝis antaŭ 70 000 jaroj post grandega erupcio kaj la rezulto estis grandega, bela, profunda (je 46 metroj) lago.

Mia loĝejo troviĝis je 3 metroj de la lago-bordo kun belega vidaĵo kaj dum la nokto mi povis aŭdi la ondetojn kiuj frapas la lagobordon!

Mi pasigis tie 4 tagojn, ripozante, naĝante, parolante kun interesaj kunvojaĝantoj, sed precipe nenion farante! Nur dum unu tago mi trairis la insulon Samosir per motorciklo (en posta selo) por vidi iom da la loka kulturo. Tio vere estis ĝuinda fino de mia ferio!



Anoncoj

“Romanoj el ĉiuj ĉieloj” - Limdato ne prokrastebla: 21-a de septembro 2016
 Nova konkurso: verkoj tradukitaj en Esperanton el iu ajn lingvo. Vidu la regularon ĉe <http://iconcoursidisamideano.altervista.org/KonkursoRomanoj.html>.

Somera programo ĉe la kastelo de Greziljono en Francio

12-17 junio: La Luaro laŭ la vortoj. Gloraj verkistoj kaj la kasteloj de la Luaro. Kultura kaj turisma semajno kun Catherine Kremer.

4-15 julio: Dektaga kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto kun Christian Rivière. Komparstudo de la tempo-problemo inter Esperanto kaj la franca.

6-13 aŭgusto: SOMERAS, Esperanto-studad-semajno kun Mikaelo Bronŝtejn, Tim Morley, Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein, kaj Marion Quenut.

21-28 aŭgusto: Festa semajno por infanoj, adoleskantoj kaj familioj, por prepari la novan lernojaron kun Elisabeth Barbay, Ansofi Markov, Jean-Luc Kristos, Nicky Janssen.

La mistera foto

En la lasta numero de ESK aperis ĉi tiu foto de meksikiaj infanoj kaj ni demandis al nia legantaro kion ĝi signifas. Kio okazas en ĉi tiu foto? Temas pri kutimo dum post-bapta festo en Meksikio. La baptopatro ĵetas monerojn en la aeron – kiel donaco por infanoj kaj junuloj ĉe la festo.





New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Secretary/Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh, David
Dewar

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Margaret Chaldecott, Joanne Johns,
Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.